Februaro 2026

# Ĝis Cent

*Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00*
*Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com*
*Sites Internet : https://esperantolyon.org www.esperanto-france.org*




## KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

***

KoToPo : “Kiel Vi” tous les derniers mardis du mois

UAICL : “Babilrondo” chaque lundi soir

## KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES https://tjerielliono.blogspot.com/

Aŭtoroj: Amélie AUBUT - Pscal FANTGAUTHIER- Marc-Olivier GRAZIANI -

## ANTAŬPAROLO

**Karaj membroj de Esperano Lyon,**

La estraro de nia asocio kunvenis la 28an de januaro ĉe la sidejo. Unue, ni preparis la jarkunvenon, kiu okazos fine de marto. Vi ricevos la oficialan kunvokon fine de februaro.

Ni ankaŭ diskutis pri la nuna jaro, dum kiu ni deziras plifortigi nian komunumon.

Tial ni invitas vin partopreni en la ĵaŭda reta babilrondo, malfermita senpage al la membroj de nia asocio. Tio estas parola momento, dum kiu ni plibonigas nian Esperanton, parolante kun la aliaj partoprenantoj.

La ideo estas facila: vi elektas vorton, kiu reprezentas vian semajnon, kaj preparas mallongan tekston por klarigi, kial vi elektis tiun vorton. Poste, la partoprenantoj pridemandas la prezentanton por ricevi pli da detaloj, helpi lin paroli kaj ankaŭ kuraĝigi lin. Eventuale, laŭ la restanta tempo, la instruistoj (Andrea kaj Jérôme) povas proponi alian aktivadon por daŭrigi la plezuron. La etoso estas ĉiam amika (legu poste la artikolon de Amélie!).

Ne hezitu kontakti nin por partopreni ! Ni ĝoje sendos al vi la retligilon, kaj ni aldonos vian telefonnumeron al la dediĉita WhatsApp-grupo. Fine, mi deziras precizigi, ke oni atendas regulan partoprenon : temas pri engaĝiĝo. Se vi ne povas veni iun tagon, sufiĉas anonci tion en la WhatsApp-grupo.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

ESPERANTO LYON

☛ **Letero de leganto :** De E-vojaĝanta Ruslandano : artikoleto por via revuo..., Antaŭdanke por li (nefotiĝema) kaj sezon-bondezire al vi, Jorgos.

--- "Ming", 16 nov. 2025 : Kontaktoj : Mi verkis novaĵon por via murĵurnalo. :)

EL NOTLIBRO DE VOJAĜANTO.

En la notlibro de iu vojaĝanto aperis jena noto dum li preterpasis sabate vespere iun vilaĝon en francia provinco...

<< En la vilaĝo Verniolle mi trovis belan ZEO-on - Ĝardeno de Esperanto (43.080805, 1.649219).

Dum mi fotis ĝin mi rimarkis, ke la fosto de "Jardin de l'Espéranto" kliniĝas for de la rekta linio al la fina venko (Bildo 1).

Je mia miro en mallumo de novembra nokto en Ariège aperis loka esperantisto, kiu korektis la situacion! (Bildo 2).

Inter Esperantistoj-ĝardenistoj estas onidiro, ke kun bona zorgo ĝardeno de Esperanto povas fruktedoni dum la tuta jaro. Sukcesojn al diligentaj kolegaranoj! >>.







☛ **Vortoj de la semajno -** Amélie AUBUT

Ĉiu semajne, kadre de la ĵaŭda retkurso, en kiu mi partoprenas, ĉiu partoprenanto prezentas sian "vorton de la semajno". Tiu ekzerco ebligas nin paroli pri ĉiutagaĵoj, trovaĵoj, ŝatokupoj, ktp. Iom post iom, nia parolkapablo pliboniĝas kaj nia vortprovizo pliiĝas.

Ni lastatempe diskutis pri lasero ĉar unu el ni havis laseran okulkirurgion. Dorlotbestoj estis la vorto de alia partoprenanto. Cetere, katoj ofte aperas sur la ekrano dum nia retkunvenoj. Alia lernanto elektis "malvarmiĝo" kiel sia vorto de la semajno. La aŭtuno supozeble influis ankaŭ la elekto de "teo" kaj de "pecokudraĵo".

☛ **Ĉina vintra poezio -** Marc-Olivier GRAZIANI

Verkita la 21an tagon de la 11a monaton de 9a jaro *Tai Ho*

Dika mantelo, varma ĉapo, komfortaj pantofloj el lano,
Ĉambreto, malalta fenestro, profunda stovo en la tero,
La korpo ripozas, la koro trankvilas, ankoraŭ ne ellitiĝita,
La oficialuloj de la okcidenta ĉefurbo, kion ili konas pri tio?

Po Ĉu Yi 白居易 unu el la plej famaj poetoj de la dinastio *Tang* (772–846 p.K.)

☛ **Tri bonaĵoj en esperanto** - GRAZIANI Marc-Olivier

Scienca esploro, gvidata en 2005 de Martin Seligman, montris ke simpla ĉiutaga kutimo povas havi pozitivajn efikojn al nia mensa bonfarto. La metodo estas facila: ĉiuvespere oni skribas tri frazojn pri tri bonaj aferoj spertitaj dum la tago.

Dum la esploro, farita kun grupo de 577 partoprenantoj, oni observis pliiĝon de la sento de feliĉo kaj samtempe malpliiĝon de simptomoj de mensa deprimo.

Homoj, kiuj regule praktikas tiun agadon, fariĝas pli atentemaj al la pozitivaj flankoj de la ĉiutaga vivo.

Mia propono estas ke vi faru tion… en Esperanto!

Kiel vi povas efike praktiki tiun kutimon?

1. Verki: Ĉiuvespere, skribu tri bonaĵojn de via tago.
2. Esti akurata: Donu detalojn pri la okazaĵo, viaj sentoj kaj emocioj, ktp.
3. Analizi la kialojn: Provu kompreni kial tiu pozitiva okazo okazis, kaj kian rolon vi mem havis en tiu momento.
4. Varii la frekvencon : Ne gravas se vi ne faras tion ĉiutage. La esploro sugestas, ke similaj efikoj aperas jam per unu ĝis tri fojoj semajne.

Tiu ekzerco agas kiel “cerba trejnado” kaj kontraŭas nian naturan tendencon pensi malpozitive. Vi rimarkos, ke dum la tago vi pli aktive atentos la pozitivajn flankojn de la ĉiutaga vivo.

Krome, skribante en Esperanto, vi plibonigos vian praktikon de la internacia lingvo, kaj eble via cerbo plie ligos Esperanton kun pozitivaj spertoj!

☛ **Amuza Rakonto: la kvar studentoj kaj la rado** - GRAZIANI Marc-Olivier

Kvar lernantoj alvenas malfrue al ekzameno. Ne iomete malfrue, sed malfruege.

Ili haltas antaŭ la profesoro, interŝanĝas rapidan rigardon, kaj unu el ili ekparolas. Per voĉo funebra kaj gesto de terura fatalismo, li klarigas ke survoje okazis neeviteblan katastrofon : rado krevis!

La instruisto rigardas ilin. Longan momenton. Li atente observas la lernantoj kvazaŭ li kalkulus, mezurus, pesus. Poste li kapjesas:
- *Bone. Vi revenu por refari la ekzamenon post unu semajno.*

La kvar lernantoj eliras, kaj kontentas, ĉar ili estas konvinkitaj ke ili inventis la plej bonan mensogon: simpla, kredinda, universala. Rado ja povas krevi al iu ajn.

Post unu semajno de intensa (kaj, fakte, malbona) lernado, ili revenas, memfidaj. La profesoro akceptas ilin kun trankvila rideto kaj precizigas:
- *Por pli da justeco, vi trapasos la ekzamenon en apartaj ĉambroj. Vi ne devas esti en la sama ĉambro.*

Ili obeas. La pordoj fermiĝas. Silento aperas en ĉiu ĉambro.

Sur ĉiu tablo kuŝas folio.
Nur unu demando.
Skribita per grandaj literoj, meze de la paĝo :

« Kiu rado krevis ? »



☛ **El Salvador** - Pascal FANTGAUTHIER



Estas malgranda lando en Ameriko Centra. Ĝi estas ĉirkaŭita de Honduro norde kaj oriente, kaj de Gvatemalo okcidente, kaj de la Pacifika oceano sude. Montaro de vulkanoj superas malgrandajn marbordajn ebenaĵojn.



La lando vivas de agrikulturo kaj ĉefe de la kulturo de kafo kaj sukero.

La lando estis popolita unue de majaoj, kiuj postlasis du gravajn arkeologiajn situojn: la situo de Cihuatán kaj la situo de Tazumal. La hispanoj ne postlasis multajn gravajn spurojn, krom la vilaĝo de Suchitoto kun ĝia katedralo kaj ĝiaj malgrandaj koloniaj domoj.

Poste, dum la jaro de la hispana imperio, El Salvador estis aneksita de Meksiko, poste de Gvatemalo, kaj ĝi fariĝis sendependa en 1841.

En 1931 generalo Hernández Martínez, subtenita de riĉaj bienuloj de kafaj plantejoj, prenis la potencon. Sekvis ribelo de kamparanoj kaj indianoj.

La ekonomio amasŝanĝiĝis. Inter la indianoj estis 20 000 mortintoj. Pro tio la indiana loĝantaro preskaŭ komplete malaperis. Oni strebis plene imponi la lingvon naŭatlon en la vilaĝoj kie la indianoj estas multaj.




De 1979 al 1992 la lando frontis intercivilan militon inter diktatora reĝimo, subtenita de Usono kaj riĉaj bienuloj, kontraŭ malriĉaj kamparanoj subtenitaj de komunistoj. Multaj personoj estis murditaj fare de la armeo. La ĉefepiskopo Óscar Romero, vera ŝtata heroo, defendis la malriĉajn kamparanojn.



Post la intercivita milito la lando travivis periodon de nesekureco kun ŝakristoj de drogoj. Elpelitaj, ili iris al Usono. La intercivita milito kaj poste la nesekureco instigis elmigradon al Usono de unu miliono da salvadoranoj.

Nun, pro la batalo kontraŭ bandoj, efektivigita de la nova prezidanto Bukele, la lando iĝis sekura. La elmigrantoj revenas al sia lando por krei siajn entreprenojn, kaj San Salvador fariĝis tre ŝatata turisma destino. La homoj estas tre simpatiaj kaj gastamaj.

